


En la aktlibro de la Grupo Esperantista Jovellanos, post la kunsido de la 17a de februaro de la jaro 1969, en kiu oni analizis la rezulton de la kurso gvidita de Santiago Mulas kaj oni bedaŭris ke ne estis favora respondo de la gelernantoj de la antaŭaj kursoj, al kiuj oni alvokis per speciale presita salutkarto, ne estas aliaj aktoj ĝis la 29a de septembro de la jaro 1976. Estas, do, iu silento de pli ol 7 jaroj kaj duono pri la vivo de la esperantista grupo. La nova akto, kaj tiuj sekvantaj, ne plu estas subskribataj de J. Ordieres sed de nova Sekretario, Faustino Castaño, kaj kiel Prezidanto subskribas nun Santiago Mulas. Iamaniere, en la teksto de tiu akto de septembro 1976 oni intencas resumi la historion de la E-grupo dum la antaŭaj sep jaroj. Sed, indas ke ni transskribu ĉi tie la tutan akton tial ke estas en ĝi plia interesa informo. Ĝi tekstas tiele:

***Ekde la lasta akto de la 17a de februaro–1969, la Grupo de Esperanto travivis periodon en kiu eĉ se la agado iome malpliiĝis, tamen ĝi ne tute interrompiĝis. Oni povas resumi la historion de la Grupo dum tiuj jaroj jene:***

***En la jaro 1970 S-ro Santiago Mulas definitive anstataŭis Alberton Menendez-n kiel instruisto de la kursoj de Esperanto. Oni faras kelkajn kursojn kun mez-nombra ĉeestantaro; oni partoprenis en la landaj E-kongresoj kaj oni organizis en la Ateneo de Gijón kunvenojn de la esperantistoj de Asturio, samkiel iu ekspozicio de almanakoj.***

***Speciale multenombra estis la ĉeestantaro de la kurso 1975-1976 kiu estis komencita de pli ol 60 gelernantoj, el kiuj finis ĝin deko da ili. Je la fino de tiu kurso oni reorganizis la estraron de la Grupo, kiu restis tiele:***

***Prezidanto: Santiago Mulas Gallego***
***Direktoro: Adonis González Meana***
***Sekretario: Faustino Castaño Vallina***
***Kasisto: Quiterio G. Ballesteros***
***Bibliotekistino: María Nieves García***
***Voĉdonantoj: José Ordieres Dacosta,***
***Vicente González,***
***Heriberto Coto,***
***Marina Piquero***

***Decidinte poste la eldonadon de iu malgranda esperantista gazeto, dumonata, titolita Heleco, el kiu jam estas publikigita la unua numero.***

***Oni decidis ankaŭ la partoprenon de gijona ĉeestantaro en la 36ª Hispana Kongreso de Esperanto, en El Ferrol. Oni akordis ankaŭ la realigadon de nova E-kurso, tiu de 1976-1977 kies komenciĝon oni antaŭkalkulas por la venonta 4a de oktobro, kaj alia regiona kunveno de la asturaj geesperantistoj, okazonta venontan 24an de oktobro.***

Rimarkindas ke la nova estraro de la Grupo, supre transskribita respegulas la kvar diversajn devenojn de la asocia membraro. Estas en ĝi homoj kiel Santiago kaj Ordieres, kiuj reprezentas la antaŭan etapon de la urba esperantismo. Marina Piquero apartenas al la aro da geesperantistoj kiuj aldoniĝis al nia movado sekve de la E-kursoj kiujn gvidis dum tiuj jaroj Santiago Mulas ene kaj for de la Ateneo. Alia deveno estas reprezentata de Adonis G. Meana en la komitato. La nomo de tiu samideano aperis jam kelkfoje en nia historio sed kiel membro de la E-Grupo **La Verda Kolombejo** de El Entrego. De nun li aperos multfoje en nia historia raporto sed jam kiel membro kaj Subprezidanto de nia gijona E-grupo. Okazas ke tiam jam ne plu ekzistis **La Verda Kolombejo** ĉar ties membraro translokiĝis al aliaj urboj pro labor-kialoj; grandparto el ili venis al nia urbo kaj membris de tiam en la **Esperantista Grupo Jovellanos**. La kvin ceteraj membroj de la grupa estraro devenas el la ĉeestintaro de la E-kurso 1975-76. Kompreneble, el ĉiuj kvar devenoj de la estraranoj estis en la grupo pliaj membroj, kies nomoj kaj agado estos menciataj laŭlonge de la cetero de nia historio.

Menciindas ankaŭ tio ke kiam nia grupo volis krei gazetan presorganon oni ne reprenis la nomon **Ŝpruci**, de la antaŭa etapo de la grupo, sed **Heleco**, kiun jam uzis iam **La Verda Kolombejo**.

Do, ni vidas ke tiam estis transira etapo en nia grupo esperantista de Gijón, sed la transira situacio daŭris ĝis la fino de la periodo, kiam nia esperantista rondo ŝanĝis sian leĝan staton kaj reakiris la antikvan nomon **Astura Esperanta Asocio**.